
# !! Du sanigaj aparatoj por anstataŭi sporton !!

# „Hellas" kaj „Velotrab"

**por anstataŭi remadon!**
**La plej bona aparato por hejma remado!**

Oraj medaloj
Bruxelles 1910 kaj Dresden 1911

**PREZO:**
Sm 67.–
(transmare Sm **71.**–)
el mahagona ligno Sm 92.–
(transmare Sm **96.**–)





**Ĉiutage ¼ hora remado per „Hellas"**

*Jen la plej bonaj iloj por resti sana!*

aŭ

**por anstataŭi rajdadon, bicikladon kaj iradon montsupren!**




**PREZO:**
Sm 94.–
(transmare Sm **98.**–)

**ĉiutage ¼ hora rajdado per „Velotrab"**

Prizorgi, ke la homa korpo ne malsaniĝu kaj fariĝu forta kaj kontraŭstarebla al malsanigaj atakoj!

**Jen la plej grava celo de la higieno!**

Sporto estas jam de longe bone konata kaj multe uzata rimedo por tio! Sed estas necese, ke oni plenumu ĝin preskaŭ ĉiutage. Bedaŭrinde al la plej multaj homoj mankas la tempo por tio. Do aparatoj, kiuj ebligas plenumi taŭgan sport-movadon hejme kaj ne postulas multe da tempo por plenumi ĝin, estas dezirindaj objektoj por ĉiu familio. Ĉar ĉiutagaj gimnastikaj ekzercadoj per „Hellas" aŭ „Velotrab" 1. fortigas la muskolojn kaj donas al la korpo streĉecon kaj forton, 2. plivastigas la pulmojn, 3. fortigas la kormuskolojn, 4. forigas la grasaĵojn, 5. plibonigas la digestadon kaj 6. refreŝigas la nervojn lacigitajn per dumtaga, precipe spirita laboro.

PREZO:

Sm 32.–




„Sanax“-vibrilo kun 4 enmetaĵoj

# „Sanax“

(parolu: sanaks)

elektra manvibrilo por masaĝo de la vizaĝo kaj de la tuta korpo! Malpeza! Tuj uzebla! Per ŝtopila kontakto oni povas enmeti ĝin en ĉiun kontakt-kesteton de la elektra fadenaro. Por funkciigi ĝin, oni turnu nur la interuptoron. Ĝenerale oni uzas la tulipoforman enmetaĵon por masaĝo de la kapo, la diskoforman kaŭĉukan por masaĝo de la vizaĝo, la kugloforman kaŭĉukan por masaĝo de la nervoj kaj la ebonitan diskoforman por masaĝo de la tuta korpo.

Ju pli forte oni premas la vibrilon sur la korpon, des pli forta estas la masaĝo.




Diversaj aplikoj de „Sanax“-masaĝo

---

Ĉiuj aparatoj estas haveblaj nur je antaŭa pago (konto No 682 de Ĉekbanko Esperantista London). Ĉe mendoj de elektraj aparatoj **oni ne forgesu sciigi pri la tencio** (voltkvanto) **kaj speco** (ĉu alterna, ĉu samsenca fluo) **de la tiea elektra fadenaro.**

**Bonvolu skribi la adreson precize, klare kaj legeble** (plej bone aldonu stampilon)!

En la prezoj la pakaĵo estas enkalkulita. La forsendo okazos ne afrankite kaj je risko de la mendinto.

Haveblaj pere de

## S. R. BREIGER, BERLIN NW 6

Luisenstr. 51 G, Germanujo.

Pluaj prospektoj estos haveblaj por 2 respondkuponoj.

**Bonvolu turni!**

Necesega por ĉiu familio estas la elektra varma kaj malvarma aerduŝo

# „Fön“

(parolu: fēn)

**pro sia multflanka uzebleco por hejma kuracado; por sekigi la lavitan hararon; por varmigi la litojn kaj la bantolaĵojn; por rapidege sekigi lavitajn gantojn; por krispumi la plumojn; por flegado de bestoj; por sekigi fotografaĵojn kaj teĥnikajn desegnaĵojn ktp.**




**Jen la preferoj:**

**Malgranda pezo; do nenia laciĝo de la mano! Fortega aerblovo! Varma aero tuj post la enmeto! Ne detruebla hejtigilo! Fortega motoro!**

**Prezo: Sm 16.—**

## Trifoja interuptado!

**Kalt! (malvarma!)**

**Warm! (varma!) — Aus! (eks!)**

**Jam preskaŭ 100000 aparatoj uzataj!**




La **„Fön“**-aparato por sekigi la hararon



La aparaton „Fön“ oni forsendas tuj uzebla; la ŝtopilan kontakton de ĝia elektra ŝnuro oni nur bezonas enmeti en la kontakt-kesteton de la doma elektra fadenaro. Jen la „Fön“ uzebla! Kie kontakt-kesteto ne estas, oni nur bezonas enŝraŭbi ŝraŭban kontaktigilon en elektran lamptenilon (v. bildon). Por funkciigi la „Fön“, oni turnu la interuptoron dekstren 1. al „Kalt“ (malvarma), tuj elvenos el la tubo de „Fön“ tre forta malvarma aerblovego; 2. oni turnu ĝin al „Warm“ (varma), tuj la aerblovo fariĝos varmega; fine turnu ĝin 3. al „Aus“ (eks) kaj la aerblovo ĉesos.

Por aliigi la intensecon kaj varmon de la aerfluo, oni povas surmeti diversajn tubojn; ju pli malgranda la kalibro de la tuboj estas, des pli fortaj estas intenseco kaj varmo. Sambone oni povas aliigi ilin per alproksimigo kaj malproksimigo de „Fön“.

Por anstataŭigi la eluzitan varmigilon per nova, oni nur turnu la surmetitan tubon iom maldekstren kaj forigu ĝin antaŭen; same oni forigu la malnovan hejtigilon, kiu estas enmetita kaj fiksita per stiftoj en du truetoj (v. bildon) kaj surmetu novan; fine oni ree surmetu la tubon kaj turnu ĝin dekstren. La kontakt-kesteton oni devas bloki per 6 amperoj. Ŝmiri oni ne bezonas; la ŝmirado estas aŭtomata.



La **„Fön“**-aparato por rapidege varmigi bantolaĵojn





La „Fön"-aparato por kuraci reŭmatismon




Klarigo de la konstrueco de „Fön" kaj de la forigo de la hejtigilo.



La „Fön"-aparato por sekigi lavitajn gantojn




La „Fön"-aparato por kosmetika plibonigo



2 tuboj je diversaj kalibroj (po Sm 0.500)



Hejtigilo (Sm 0.600)



Ŝrauba kontaktigilo (Sm 1.—)



La „Fön"-aparato por flegado de bestoj

## Sambone uzebla estas la „Fön"-aparato ĉe diversaj metioj:

**En sanatorioj, kuracejoj por kuracado de reŭmatismo, artrito, por anstataŭi varmegajn kompresojn ktp.;**

**en presejoj por varmigi vintre la farbojn kaj farbkestetojn, sekigi la presaĵojn ktp.;**

**en apotekoj kaj ĥemiaj laboratorioj por rapide vaporigi solvaĵojn kaj por sekigi la sedimentojn kaj la purigitajn vitraĵojn;**

**en teĥnikaj oficejoj por sekigi desegnaĵojn kaj kopiaĵojn ktp.**



La „Fön"-aparato por sekigi la hararon



La „Fön"-aparato por sekigi fotografaĵojn

**Bonvolu turni!**